

POLA ESPERANTISTO

JARO XXIII. • JANUARO 1929. * NR. 1.



Biblioteka Jagiellońska



1002376582

ROK XXIII. • STYCZEŃ 1929. • NR. 1.

ESPERANTYSTA POLSKI

WYDAWCY: POLA ESPERANTISTA KLUBO &
ELDONANTOJ: SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW

ADRES: KRAKÓW, ULICA LUBICZ Nr. 34.

REDAKTOR PROF. DR. ODO BUJWID REDAKTANTO

PRENUMERATA: rocznie Zł. 8.—, półrocznie Zł. 4.—. Dla towarzystw i grup esperanckich (przy przesyłce najmniej 5 egz. pod jednym adresem roczna prenumerata Zł. 6.—.

ABONO: jare Zł. 8.—, duonjare 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono Zł. 6.—

Konto Pocztovej Kasy Oszczędności Kraków Nr. 406.660.

Eksterlande jarabono — 1 dolaro.

Pojedynczy numer Zł. 0.70 Aparta numero.

OGŁOSZENIA:

ANONCOJ:

1 strona	Zł. 60.—	1 paĝo	Zł. 60.—
1/3 strony	„ 32.—	1/3 paĝo	„ 32.—
1/4 strony	„ 17.—	1/4 paĝo	„ 17.—
1/8 strony	„ 10.—	1/8 paĝo	„ 10.—

TREŜĆ — ENHAVO:

DR. J. MĘDRKIEWICZ (LUBLIN): POLLANDO KAJ ESPERANTO. THETA (LAŬ TOMANEK): 75-JARA JUBILEO DE PETROLA LAMPO. JAH-ŜMIECHOWSKI (TRAD. T. HODAKOWSKI): LA VIVO. JANUSZ KORCZAK (TRAD. A. WEINSTEIN): BIRDISTO. G. R.: SKOLTOJ KAJ ESPERANTO. O. BUJWID: ESPERANTO EN BRAZILIO. T. GRABOWSKI: PAROLADO DUM LA AKCEPTO ĈE LA POLA LEGACIO. BULTENO DE U. E. A. I. LEJZEROWICZ (ŁÓDŹ): CITADELO DE ESPERANTO. TRADUKA KONKURSO. TEJOT (PRZEMYŚL): POLLANDA KRONIKO. B. TUSZKIEWICZ: KRONIKA ZAGRANICZNA. UZUPEŁNIENIE SŁOWNIKA POL. ESP. KOMUNIKOJ DE P. E. D. AL LA TEKA-ANOJ. LETERKESTO.

POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO
KAJ EKSTERLANDE.

ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANTYCKIEGO W POLSCE
I ZAGRANICĄ.

ROK XXIII. JARO.

KRAKÓW
STYCZEŃ 1929 JANUARO

Nr. 1 N-o.

POLLANDO KAJ ESPERANTO.

Publikigante la interesajn konsiderojn de nia ŝatata kunlaboranto ni devas rimarki, ke ni ne plene konsentas kun ĉiuj liaj hipotezoj kaj argumentoj.
(Rim. de Red.).

La jaro 1887 por evoluo de mondcivilizacio estos dato historia. La malgranda broŝuro de D-ro Esperanto sub modesta titolo „Lingvo internacia“, fariĝos estonte tre valora skriba dokumento, kiu kiel limkolono staros inter du epokoj. Pesimistoj povas kontraŭdiri tion, ĉar malgraŭ pasintaj 41 jaroj, la esperantista movado ankoraŭ ne estas foliuminta karton de l' historio. Jes, ĝis certa grado tio estas vero, sed oni ne pretervidu, ke kvankam sen bruo, tamen jam sur tre vasta terspaco prepariĝas tio, kio poste ekregos kaj influos bonfare la vivon en ĉiuj landoj kaj de ĉiuj popoloj. Estas malfacile antaŭvidi kaj konkrete priskribi ĉiujn sekvojn, instaliĝontaj en vivo nacia, socia, ekonomia, politika, morala, intelekta kaj eble eĉ religia, kiam lingvo internacia Esperanto estos plene rekonita kaj akceptita de lernejoj kaj regnoestraroj en ĉiuj terpartoj. La leĝo pri komplikigo, tiu plej unua kaj plej fundamenta en vivo de l' universo, nun limigita kaj ĉirkaŭbarata de lingva diverseco de l' homa gento, tiam ekagos pli libere, kreante novajn vivoformojn de l' homa civilizacio.

La celo de tiu ĉi artikolo estas pripensi, iom analizi, ĉu oni povas eltrovi ian ajn kunligon inter loko de naskiĝo de Esperanto kaj idearo, por kies realigo D-ro Zamenhof kreis kaj publikigis sian inventon, kaj kiu estas bazo jam ne de lingvo mem, sed de tiu ĝenerala kultura movado, kies nomo estas — esperantismo.

Rigardante la temon supraĵe oni povas riproĉi aŭtoron pri metafizikismo. Je tio tamen estas la respondo: nihil sine causa. Intelekta vivo de l' homo estas naturfenomeno kaj leĝoj de natursciencoj adaptiĝas ankaŭ al ĝi. Intelekta vivo estas problemo tre komplikita kaj bedaŭrinde ankoraŭ nesufiĉe al scienco konata. Pro tio la subaj riprenoj havas pli karakteron de hipotezo ol de pruvita teorio, sed tion oni povas substreki, ke ĝi estas bazita sur analizo de naturaj kondiĉoj, kiuj akompanis aperon de lingvo internacia de D-ro Esperanto.

Demandata de scivoluloj, kio influis lin krei lingvon internacian D-ro Zamenhof rakontis, ke unua impulso, puŝinta lian pensmanieron,

estis impresio infana, spertita en la naskiĝurbo Białystok, kie vivis kvar nacioj: poloj, rusoj, germanoj kaj hebreoj pli malpli malakorde, ĉefe pro lingva diverseco. Sed tia cirkonstanco kiel en Białystok ne estas unikajo. Centoj da aliaj urboj kaj urbetoj en la mondo montras nacian intermikson kaj ofte en pli granda kaj akra grado ol Białystok. Tiu cirkonstanco kvankam sendube povis vekii en psiko de multaj individuoj koncepton, ke unu komuna lingvo eble pacigus la diverslingvanojn, tamen per si mem ne sufiĉis por influu iun ajn krei efektive lingvon internacian. Do kontakto senpera kun malbonaj sekvoj de diverslingveco prezentas nur unu el faktoroj en formiĝado de Esperanto.

D-ro Zamenhof laŭdevene, kiel sciante, apartenis al juda gento. La lasta ekster Pollando estas dissemita en multaj urboj tra la mondo kaj vivas en kondiĉoj de nacia intermikso. Malgraŭ tio juda intelekto nenie alie ol en Pollando provis solvi demandon de lingvo internacia, kvankam problemon de lingvo artefarita judoj kelkfoje solvis en sia historia evoluo kaj migrado, kreante diversajn jargonajn, ĉu hispanan, ĉu tiun similan al germana lingvo, ĉu eĉ kreante jargonajn vortojn laŭ radikoj polaj, rusaj kc. Tiurilate juda popolo montris sendube certan kapablecon en grado pli forta ol aliaj nacioj, kaj tiu ĉi intelekta eco povas esti rigardata kiel dua faktoro en formiĝado de Esperanto.

Plue oni devas memori, ke ideo pri lingvo internacia estas sendube altgrada kultura ideo, intime ligita kun historia evoluo de eŭropa civilizacio, do oni rajtus esperi, ke plej kulturaj landoj kaj nacioj solvos la problemon, kaj landoj kulture malprogresintaj estos en tiu direkto pasivaj. La lasta supozo montris sin vera, sed la unua nur parte, ĉar plej kulturaj landoj ne donis solvon de l' problemo. Estas vero, ke germano pastro Schleyer kreis lingvon artefaritan, sed nur kvazaŭ sur formala, teoria bazo. Li faris artifikon, mekanikajon, li uzis arbitre elpensitajn kombinojn de sonoj por kreo de lingvo kaj efektive lingvon li kreis, sed li ne kreis naturan lingvon internacian. Kio koncernas francojn kaj anglojn, do kvankam inter ili estis mensoj pripensantaj ideojn pri lingvo internacia, tamen nenio kristaliĝis, eĉ kontraŭe ambaŭ nacioj ofte pretendis prezenti propran nacian lingvon por uzo de ĉiuj kulturaj popoloj, al kio en certa grado rajtigis ilin politika, historia kaj kultura pozicio. Kaj jen tiu eŭropa kulturo, baziĝanta sur antikva roma kaj greka, prezentas trian faktoron, kiu devis ekposedi kaj saturigi menson de la kreinto de lingvo internacia. Ĉiuj supre elmontritaj tri faktoroj tamen ne estis sufiĉaj per si mem por solvi la problemon. Ili prezentis nur kvazaŭ naturan grundon, fekundan glebon, al kiu mankis krea ideo, forta voloimpulso.

Kaj jen venis momento por preparoli kvaran kaj lastan faktoron. Ĝi kuniĝas kun la problemo de nacispirito, kun la demando, ĉu aparta lando-nacio havas ankaŭ apartan, kvazaŭ propran spiriton alinomate karakteron, kiu estante rezulto de ĝia genezo kaj historio nevideble influas individuajn spiritojn de aparta civitano. Sendube tiel estas. La popola genio per kelkaj trafikaj vortoj aŭ bildoj eĉ scipovis esprimi tiun ĉi karakteron, tiun ĉi spiriton de aparta nacio. Ekzemple kiel oni imagas en plej ĝeneralaj trajtoj Anglujon? En bildo de John Bull,

kaj oni komprenas sub tiu metaforo riĉecon, forton, surmaran regadon, kolonian ekspluaton, komercon ktp. Se oni volas prezenti similan maniere karakteron de franca nacio, oni ne trovas pli ĝustajn vortojn ol: *liberté, fraternité, égalité* kun ankoraŭ unu larĝsenca vorto: *esprit*. Por Germanujo karakterizaj ideoj estas: *Arbeit, Ordnung, Faustrecht, Deutschland über alles*. Por Ruslando: despotismo ĉu cara ĉu bolŝevika, kunigita kun mallibereco kaj krueleco. Simile oni povus en skizo difini karakteron de multaj aliaj nacioj. Nun oni devas demandi, ĉu suprecitataj naciaj „spiritoj“ enhavas en si ĝermojn de estonta „esperantismo“.

Ŝajnas, ke ne multe. Kaj tamen ĝi kiel fajrero ekbrilis en 1887 jaro en Varsovio, tiam malfeliĉa ĉefurbo de pola lando, kruele dispartigita per siaj tri potencaj najbaroj. Kaj de la unua momento de sia apero tiu ĉi lingvo internacia, naskita en Varsovio, naskita sur pola tero montras tion, kio mankis al konceptoj de diversaj antaŭirintoj kaj kio prezentas kvaran faktoron. Ĝi montris *k o r o n*. Ne sole menson. Ĝi montris profundan *s e n t o n*, ne sole logikon. Ĝi montris politikan ideon pri unio de popoloj sur fundamento de egalrajteco kaj libereco. Ĝi montris lingvan komunecon de popoloj kaj konsekvence ekdeziris gvidi ilin al komuneco de l' kultura vivo kaj laboro. Ĝuste tiu ĉi ideo pri unio estas plej ĉefa ideo de pola menso kaj politika instinkto. Ĝi sin montris evidente dum kuro de l' jarcentoj en pola historio. Poloj ne atakis milite najbarojn, ne entreprenis konkerajn militojn, ne sklavigis aliajn popolojn, ne subpremis nacian lingvon de aliaj popoloj. La principo „*równi z równymi, wolni z wolnymi*“ (egalaj kun egalaj, liberaj kun liberaj) estis historia pola tezo, laŭ kiu pola regno kunigis kun litova-rutena regno libervole, laŭ bona konsento por komuna bonsorto aŭ male, kaj tiu unio daŭris jarcentojn kaj daŭras eĉ ĝis nun. Pola politika instinkto kunigis tri grandajn naciojn: polan, litovan kaj rutenan kaj kreis potencon, vastan, demokratan regnon, kiu daŭris de XV. ĝis XIX. jarcento. Tiu ĉi pola ideo pri libervola kunigado de nacioj radiis al najbara nacio ĉeĥa, slovaka, hungara, ĝi eĉ penetris norden al rusa Novgorod kaj Svedujo. Kiel lasta reflekso de tiu ĉi ideo povas esti rigardata la epoko, kiam Polujo kaj Saksujo havis komunajn reĝojn. Sendube certan influon kaj plifaciligon kaŭzis simileco de la lingvoj slavaj kaj oni ne devas forgesi grandegan signifon de tiama internacia lingvo-latina, kiu en Pollando siatepe estis multe ŝatata kaj tre disvastigita.

Ideo de unio en Pollando agis ne sole sur kampo politika, sed ankaŭ religia. Kiam reformacio kaŭzis en aliaj landoj terurajn reciprokajn persekutojn, en Pollando regis ne nur toleremo kaj libereco, sed estis farataj provoj de religia unio, kaj postsigno de tiu agado vivas ĝin nun sub formo de greka-katolika konfeso.

Kaj jen tiu ĉi pola „*genius loci*“ influis la spiriton de Zamenhof, vekis en li nevenkeblan deziron doni eblon al unio jam ne de tri aŭ kvar najbaraj nacioj, sed al unio de ĉiuj nacioj de l' mondo laŭ principo: egalaj kun egalaj, liberaj kun liberaj por komuna laboro, prospero kaj bono. Kaj jen en tiu ĉi civilizacie-politika ideo kuŝas emocia forto de la lingvo internacia Esperanto, kiu ĝin gvidos al decida venko.

Dro Jan Mędrkiewicz (Lublin).

75-JARA JUBILEO DE PETROLA LAMPO.

Roka oleo (nafto) estis konata de nememorataj tempoj; konis ĝin Egiptanoj, Persoj, Judoj, Grekoj, Japanoj, Ĉinoj longe antaŭ la kristana erao, sed la ĝusta utiligado de tiu-ĉi netaksebla trezoro de l' tero okazis nur en la pasinta jarcento. Antaŭe la nafton oni uzis nur kiel ŝmirajon al veturiloj, kiel kungluilon ĉe masonado, kelkiam kiel sanigilon anstataŭ balsamo por vundoj aŭ materialon al lumigado en lampetoj. Oni provis ankaŭ purigi tiun-ĉi oleon, por ricevi fluaĵon pli klaran, tamen tiuj-ĉi provoj neniam sukcesis esti io pli ol primitivo.

En Polujo la nafto, kiu aperas grandkvante preskaŭ sur la tuta apudkarpata teritorio, estis konata kaj utiligata depost tre longaj tempoj. Dokumentoj pruvas, ke la urboj Drohobycz kaj Krosno jam en XVI jarcento posedis privilegion de lumigado per nafto. Sed al la pli granda disvastiĝo de tiu-ĉi lumiga materialo en Polujo samkiel en aliaj landoj, kie la nafto aperadis, estis malhelpoj: malmulte disvolvita mineja tekniko, komunikaj malfacilaĵoj, nescio kiel konduki kun tiel facilbrula materialo ktp.

Kaj dume en profundo de l' tero atendis tiuj nemezureblaj, simpledire malfacile elĉerpeblaj provizoj de tiu-ĉi fluida mineralo, kiuj estis portontaj al la homaro novan epokon, eksterordinaran disvolviĝon de la industrio, kaj eĉ plenumantaj ĝiajn Ikarajn revojn. Se ni parolas pri tiu-ĉi nova epoko, ni ne pensas nur pri la revolucio farita en la tekniko per la nafto, sed simple pri ĝia kultura signifo. Ĉar oni povas diri kiel certajon, ke la momento de pligrandiĝanta bezono de lumo estas identa kun la momento ne nur de lumigado, sed ankaŭ de klerigado de grandaj homamasoj. Tio, kion ni nun nomas „publika opinio“ estis ĝis la jaro 1860 prefere retora parolturno. Mizera lumo de sebaĵ kandeloj, oleaĵ lampoj aŭ keno tute ne favoris al legamo. Nur enkonduko de bona lumo petrola kreis fizikajn cirkonstancojn al disvastiĝado de legamo kaj tia-maniere al plialtiĝo de klereco.

Ne estas necese substreki, kian signifon havis la petrola lumo por la ekonomia vivo. Ĝi permesis plilongigi labortempon je kelkaj horoj en industrio, komerco kaj metio. Ĝi ankaŭ ebligis noktan trafikon en tiuj ĉiuj entreprenoj, kiuj dumnokte ne povas ripozi kiel certaj specoj de fabrikoj, fervojoj, ŝipoj.

Do tiel en komenco de la pasinta jarcento ekregis la homaron vera sopiro al ia pli bona lumo. Serĉadoj de pli konvena lummaterialo kaj provoj de kreo de pli bonaj lampkonstruoj senĉese ripetigis.

La plej bona el ili estas la invento de lumgaso. En j. 1782 konstruis Mardoĉ en Anglujo unuan pli grandan produktejon de la gaso. Baldaŭ poste oni konstruas destilejojn de bruna karbo, bitumaj ardezoj kaj nigra karbo en Polujo, Ĉeĥujo, Skotlando kaj Francujo. Tiu-ĉi gasa lumigado malrapide nur akiradis socirajton. Ĝi estas facilkomprenebla, se ni konsideros, ke al tio estis necesa fondo de la tuta fabrika konstruajaro. Do tiel nur petrolo alportis praktikan solvon de lumiga demando.

Kaj, ke tio-ĉi estis bonega solvo, estas pruvo, ke ĝis nun ankorau tre granda parto de la homaro uzas tiun-ĉi materialon al lumi-

gado. Nek la gaso, nek elektra lumo, nek acetileno, nek aliaj pli novaj manieroj de lumigado povis la petrolon forigi. Do oni ne povas vere sufiĉe pri-taksi tiun epokfarantan revolucion, kiun ekkomencis la petrolo industrio. Ĝi komenciĝis de modesta aplikado de la petrolo al la lumigado. Malrapide oni elpensadis ĉiam pli novajn manierojn profiti la ecojn de l' petrolo, malrapide la petrolo industrio diskreskadis ĝis neestinta mezuro, kaj benzino, unu el petrolaj produktoj, estiĝis la motoro de la nuntempa civilizacio, sen kiu oni eĉ ne povas imagi al si hodiaŭan teknikon komunikacian.

Depost kiu momento datiĝas tiu-ĉi seninterrompa disvolvo de la petrolo industrio. Ĝi komenciĝis de modesta aplikado de la petrolo faris provojn sendepende unu de la alaj. Ili gajnis bonrezultojn minimume en la sama tempo, do en la sesa jardeko de la XIX. jrc. Ni, Poloj, estas fieraj, ke en tiu-ĉi liberigado de la novaj energioj el naftominejoj iris fronte de la progreso. En j. 1853 estis lumigita per petrolaj lampoj universala hospitalo en Lwów. Tio-ĉi estas komenco de la pola kaj monda petrolo industrio. Usona destilajo aperis en la komerco nur kvin jarojn poste. Aliajn naftominejojn oni komencis ankoraŭ pli poste ekspluati. Do ĵus pasis 75 jaroj, kiam eklumis publike tiu-ĉi pola petrolo lampo, kiu estis samtempe la unua sur la tuta tero. 75-jara jubileo de la petrolo estas ankaŭ tiu de ĝia eltrovinto, fondinto de la petrolo industrio en Polujo, granda filantropo kaj bonfaranto de l' homaro, jubileo de Ignaco Łukasiewicz (elp.: ŭukasjeviĉ).

Ignaco Łukasiewicz naskiĝis en j. 1822 en ĉirkaŭajo de Tarnów, kie liaj gepatroj farmis bienon. Fininte studadon en mezlernejoj kaj universitatoj en Kraków kaj Wien li ricevis diplomon de magistro de farmacio kaj poste li okupis sin pri apotekista profesio.

Kvankam la nafto estis konata jam depost jarcentoj en multaj landoj, tamen la utiligado de tiu-ĉi krudajo pligrandskale ebligis nur disvolviĝo de la kemio organika okupiĝanta pri la kombinaĵoj de karbo. Łukasiewicz kiel apotekisto kaj samtempe kemiisto, ĉar tiam ĉiu apotekisto estis kemiisto, kondukita per genia intuicio inventis manieron apartigi unujn komponaĵojn naftajn de la aliaj kaj eltrovis maleraran manieron de ilia praktika utiligado en la ĉiutaga vivo. La plej granda malfacilaĵo estis tiutempe en tio, ke tiamaj petroloj estis prefere benzinoj, nome oni klopodis lumigi la lampojn per la plej malpezaj komponaĵoj de la nafto, de kie devenis grandega danĝero de brulo, malfavoro kaj timo de uzado de l' „nafto”. Oni devis apartigi nur tiujn komponaĵojn de l' nafto, kiuj kiel pli malpezaj estis pli maldanĝeraj kaj krom tio konstrui konforman lampon. Tiujn ambaŭ demandojn solvis Łukasiewicz fundamente kaj tre rapide, kaj perfektiginte siajn inventojn post multaj provoj kaj eksplodoj enkondukis ilin en la vivon. La menciita hospitalo estis la unua institucio sur la tuta mondo, kie ekbrilis la unua petrolo lampo, baldaŭ post tio sekvis lumigado de l' fervojoj ktp.

La merito de Ł. kuŝas en tio, ke li estis la unua kiu eltrovis manieron de naftopurigado per destilado kaj aplikado de sulfura acido, li unue konstruis le petrolan lampon kaj tiuj du konceptaĵoj estas ĝis nun preskaŭ sensanĝe uzataj. Ĉie konataj lampoj de Ditmar apogas sin sur la invento de Ł., kiu tute ne zorgis pri la patento por siaj

eltrovoj. Simile okazis en j. 1870, kiam la famo de Ĥ. disvastiĝis tra la tuta mondo, multe konata petrola magnato Rockefeller elsendis al Ĥ. siajn inĝenierojn, por ke li permesu al ili rekompence interkonatiĝi kun uzinoj kaj aranĝoj de Ĥ. Ĥ. montris ĉion al Usonanoj sed rekompencon ne akceptis. — Ĥ. edukis tuta armeon de naftaj teknikistoj kaj eĉ ankoraŭ nun loĝantoj de Krosno kaj ĉirkaŭaĵo, kie Ĥ. vivis kaj agis, elmigras al Javo, Sumatro kaj Orient-Hindujo, kiel specialistoj ĉe produktado de petrolo. Dank' al Ĥ. la pola petrolo plej frue aperis sur la monda foiro kaj nur kelkajn jarojn poste la usona.

Łukasiewicz multe meritis ne nur en la ekonomia vivo, sed ankaŭ en la socia. En j. 1866, kiam ankoraŭ, neniu eĉ ne revis pri la socia asekuro, li fondis en siaj naftominejoj „fratan kason“, el kiu povis profiti la laboristoj dum malsano kaj post 20-jara laboro en la minejo ili ricevas renton. Procentojn de monataj kotizoj, pagitaj de laboristoj oni destinadis por subteno de malriĉuloj, por eduko de gejunuloj, por fondi laborejojn, por doto al senhavaj knabinoj, por helpo en eksterordinaraj okazoj. Ĥ. estis nekutime entreprenema kaj agema. Ĉiun novajon, pri kiu li nur aŭdis, ĉiun pliperfektigon de labormetodoj li tuj enkondukadis en siaj bienoj kaj uzinoj. Kiam aperis en lia bieno kuraca akvo jodo-broma li tuj aranĝis banejojn, de kiu malriĉuloj profitis senpage. Posedante kiel farmaciisto certajn kuracistajn sciojn, li kuracis en vilaĝoj senrekompence.

Por mallonga karakterizo de Ĥ. oni devas diri, ke li estis persono nekutima, imitinda, pri kiu la memoro neniam devas perdiĝi. Li posedas meritojn ne nur por ni, Poloj, sed por la tuta homaro. Dornante al ĝi petrolan lumon li puŝis la civilizacion sur la novajn vojojn de l' rapida disvolviĝado. Kiel filantropo li multe bonfaris al malriĉuloj kaj bezonantaj helpon. Liaj samtempuloj tre lin ŝatis nomante lin „patro“. Unuvorte Łukasiewicz estas imitinda ekzemplo, altspirita, plenluma, en kiu profunda menso, potenca sento kuniĝis kun la belega karaktero.

Laŭ monografio de **Prof. Ludwik Tomanek** verkis Theta).

Jah-ŝmiechowski.

LA VIVO.

Bone kredi, ke vivo per rozoj sternita,
Ke nur sunajn ridetojn por ni havas ĝi,
Ke ĝi estas sincera kaj tiel amita,
Ke per briloj de l' ĝojo ludas ĝi por ni.

Bone kredi, ĉar en de la vivo danĝero
Malrapide nubigas sunplena spirit'
Kaj malrapide velkas foli' de l' espero
Kaj de l' luma fabelo senĉagrena rid'.

Bone kredi tiel longe, kiel oni povas,
Ĝis kiam kor' ne estas en sia aŭtun',
Poste l' anim' estiĝas fermita, singarda
Kaj ne kredas jam oran brilon de la sun'.

Elpoliĝis **Tad. Hodakowski** (Kraków).

Janusz Korczak.

BIRDISTO.

(Novelo)

Li estas riĉulo super riĉuloj. Li posedas la plej maloftajn birdojn krom la ordinaraj arbaraj kantistoj. Surdigas tiu kantado, ĉirpado kaj pepado, blindigas la kolorriĉeco de l' flugilhava kantistaro. Senĉesa, moviĝema, ĝaja kaj viva horo. Kvazaŭ ili estus ne en kaĝoj ornamitaj per verdaĵo kaj sunplenaj, tamen kun feraj stangoj — sed kvazaŭ ili estus sub ĉielo, en kampoj, en riĉaj, belegaj arbaroj, tiel estas ĝojiga tiu ĉi flugilhava centtona, centkolora aro. Oh! kia riĉulo li estas, la birdisto.

Grimpante sur la stangojn de l' kaĝo per kurbaĵoj beketoj kriegas terure la papagoj: jen skarлата flugilblua makao, blanka kakatuo kun flava tufo, verda loriso kun ruĝaj flugiloj, griza Ĵako — lerta dancistino — fieraj paroj kun centokulaj ventumiloj brilas diverskoloro — nigraj kaj blankaj cignoj fluas sur malgranda laĝeto de vasta kaĝo, ili flankenklinas la longajn, graciajn kolojn, ili estas silentaj kaj naĝas malrapide kaj tranĉas la puran akvon per sia larĝa brusto.

Aglo, — soleca vagulo — deŝiriĝas, etendas la flugilojn al flugo — li nur unufojon ekbatis la aeron kaj jam atingis per la kapo la plafonon.

Akcipitro-bandito avide observas la flugon de birdoj, falko rigardas la birdaron malĝojokule el la profundaj okulkavoj, rustflava gufo kaj nigra sturno kun violkolora kapo kaj strigo kun granda kapo kun malbonaŭgura, raŭka voĉo kaj mevo manĝegulo, fiŝisto kaj marra-bisto kaj kornikoj kaj korvoj-tombistoj kaj ĉio ĉi tio estas en la vitra konstruaĵo de l' birdisto-riĉulo. Kaj nia arbara kapelo malproksima kaj konstante trafluganta kaj nia aera frataro, niaj konatuloj el la herbejoj, ĝardenoj kaj el sufokaj urboj, niaj dezirataj kaj amindaj. Flava kanario, griza najtingalo, revulo trubaduro, lerta hirundo kaj pia alaŭdo, nerva motacio kaj gapema emberizo, subĵetita kukolo, kardelo elegantulo, fringo mallertulo, malpacema oriolo, manĝegulo paruo, eĉ griza pasero kaj amema kolombo. Estas nek voĉo, nek koloro, kiujn oni ĉi tie ne vidus kaj ne aŭdus. Feliĉa birdisto! Feliĉa, ĉar li ne sciis, ke la flugilhavaj kantistoj malliberuloj komencas morti.

Mortis la unua — eksilentis unu voĉo de l' horo, malleviĝis la flugiletoj kaj la plumhava kapeto, rektiĝis sur la sablo la rigidaj piedetoj de malgranda malliberulo. Poste mortis dua, tria kaj kvara. Jen sopirema najtingalo, jen alaŭdo, adoranto de spacoj. Ili ne scipovas rigardi la sunon tra la vitra tegmento de l' birdejo, ne povas enspiri aeron venenitan per ferrustaĵo, ne povas kanti kaj sonorili en bruo kaj en kriego. Ili kviete ekdormis, senplunde, sensopire. Malĝojis la birdisto, sed nur por unu momento — li havas ankoraŭ tiom de kantistoj, li ne postulas eĉ plie. Kaj denove venis morto.

Jen la aglo malsuprenfalis kaj malvarmiĝis, li videble luktis kun la malsano, ĉar sur la sablo vidiĝis postesignoj de liaj ungegoj kaj larĝaj rondoj de malfermitaj flugiloj. De nun ne pasis eĉ unu tago, ke nova kadavro ne malĝojigu la birdiston. Li prenadis la mortintan sin-

garde kaj rapide por trompi sin mem kaj trompi la restintajn birdojn — li portadis la kadavrulojn malproksimen por ne rigardi kaj baldaŭ forgesi. Li restadis pli longe en sia amata birdejo, kvazaŭ li volus ĝoji pro la vivo de l' aliaj birdoj kaj li pli zorge ankoraŭ prizorgadis siajn amindajn gastojn por anstataŭi al ili tion, sen kio ili ne povis vivi. Ĉiam pli mallaŭte kaj pli silente estis en la birdejo. La falko mortis, la gufo pereis, eta birdaro mortadis. La birdisto karesis la mortinton, deziris ankoraŭ revivigi ĉiun per sia propra varmo kaj enspiri la propran spiron — vane.

Li portis la kadavrulon en komunan kavon, irante malrapide memorigis al si lian belon.

La cigno postiris aliajn — la birdisto disigis la neĝblankan lanugon, distraĉis la birdon, eljetis la internajojn, plenŝtopis per vato, la okulojn anstataŭis per vitroperioj kaj starigis ĝin en la kaĝo, ĉar li opiniis, ke li trompos sin mem kaj aliajn. Nun li sciis, ke tiel devas esti — li nek miris, nek provis lukti, nek malĝojis kaj ĉiutage vivulon anstataŭis per kadavrulo. Li eĉ alkitimiĝis kaj ne ĉagrenis. Mortintaj birdoj vere ne vivis kaj ne postulis penojn kaj prizorgon. Kaj mortis kanarioj, kolomboj, kardeloj, cikonioj, vulturoj, malĝojaj kaj babilemaj, fieraj kaj flirtemaj, sinceraj kaj hipokritaj — la birdisto plenŝtopadis ilin kaj orde laŭ vico starigadis — li montradis ilin al siaj konatoj, sed nur tra vitro por ke ili ne rimarku, ke la birdoj ne plu vivas. Li ne volis, ke ili eksciu, ke la iama riĉulo tiel malriĉiĝis. Mallaŭte, malĝoje, surde estis tie, kie regis iam ĝojo. La restintaj birdoj ŝajnis antaŭsentis la proksiman morton, ili rigardis timeme la mortintajn kamaradojn kaj atendis sian vivofinon. Kaj okazis, ke antaŭlasta birdeto kviete fermis la okulojn, kvazaŭ ĝi subiĝus al la sorto, kun kiu ne eblas lukti. Ĝi kuŝiĝis en angulon de malplena kaĝo, malproksime de ŝtopitaj birdoj, kiuj eksidis tie, kie antaŭe ili estis vivaj. Kaj restis nur unu sola viva, unu el tiu ĉi multnombra birdaro kaj ĝi vivis poste, vivis — inter la kadavruloj.

Homo birdisto! multnombra birdaro de via animo devas kaj devis morti, tamen memoru, ne plenŝtopu la kadavrojn, enŝutante en ilin segajon, enmetante vitroperlojn en la lokon de l' okuloj kaj gardu unu, la lastan flugilhavan loĝanton de via animo, sed atentu, ke ĝi ne estu... gapema emberizo.

El la pola lingvo tradukis
Anna Weinstein (Warszawa).

SKOLTOJ KAJ ESPERANTO.

En tiu ĉi jaro, komence de aŭgusto, la ĉiulandaj skoltoj kunvenis en jamboreo, t. e. granda internacia kunveno. Sed la rilatoj inter diversnaciaj skoltoj konsistas plejparte el afablaj ridetoj kaj demandaj rigardoj, ĉar, sen Esperanto, skoltoj estas nutuloj en jamboreo. Ni do devas propagandi Esperanton en la skoltoj trupoj. Kaj la baldaŭ okazonta jamboreo estas neelasota okazo. De post 1918 ekzistas Skola Esperantista Ligo (sekretario: Trupestro Norman Booth, en Netherton, Huddersfield, Anglujo), kies celo estas grupigi ĉiujn skoltojn scipovantajn la internacian lingvon. Eliras ankaŭ ĉiumonata esperantlingva gazeto ilustrita „Skolta Heroldo“ (adreso: 22, Cours Albert 1o, Paris—VIII). Sciigu tion al ĉiuj skoltoj de Polujo kaj instigu ilin lerni Esperanton, la nepre necesan lingvon por la tutmonda skoltmovado.

G. R.

ESPERANTO EN BRAZILIO.

Kiam post 15-taga vojaĝo trans la Atlantikan Oceanon sur bela angla ŝipo Alcantara de la Royal Mail — dum kiu oni nur dufoje albordegis — mi ekvidis la teron, ne estas mirinde, ke ĝi estis longe dezirata. Vidante ĝin, precipe kiam ĝi estas tiel bela kiel en Rio de Janeiro — oni estas vere ravita.

Mi priskribos nek la belajno de la urbo, nek miajn impresojn. Eble mi havos okazon fari tion aliloke. Mi alvenis Brazilion unue por studi la tropikajn malnasojn, due por propagandi se eble esperanton.

Jam sursipe atendente la kuracistan viziton mi havis la plezuron konatiĝi kun S-o Skolimowski la sekretario de la Legacio de la Pola Respubliko, kiu alvenis por faciligi miajn unuajn paŝojn en la fremda urbo. Tuj poste alvenis raportisto de ĉi tiea gazeto „A Noticia“, S-o advokato Pederneiras Fourquim, al kiu mi devis fari intervjuon pri la celoj de mia vojaĝo. Jam vespere mi vidis artikolon kun mia bildo.

Sed mia miro atingis la supron, kiam jam la saman tagon antaŭ la vespero mi ricevis la viziton de tri konataj esperantistoj: S-o Alberto Couto Fernandes, teknika direktoro de la Telegrafo, D-ro Porto Carreiro Neto, univ. profesoro ĉe la Politeknika Lernejo ligita kun la Universitato de Rio, kaj S-o Carlos Domingues, advokato, del. de U. E. A., jam konata de la Edinburga Kongreso, kie li reprezentis Brazilion oficiale. Ĉu mirinde, ke ni tuj komencis paroli esperante, kaj kiam venis ankoraŭ la redaktoro de tre disvastigita gazeto „O Jornal“ s-o C. A. Nobrega da Cunha, li kun larĝe malfermitaj okuloj rigardis nian kvaron flue babilantan esperante: mi ne konata la portugalan lingvon, ili tri konantaj nek la polan, nek la francan, kiun parolis la Redaktoro. Li tuj esprimis en la gazeto sian admiron por la nekonata de li lingvo — nia babilado estis la plej efika propagandilo por la publiko. En kvar gazetoj mi povis legi portugale skribitajn artikolojn entuziasmajn por nia lingvo. Portugale oni povas legi kaj kompreni sufiĉe facile konante esperantan, francan kaj italan lingvojn; nur la elparolado kiel ĉiam estas iom malfacile komprenebla.

La sekvintan tagon mi ekkonis la membrojn de la Esperantista Societo: honoran prezidanton de la Brazila Ligo Esperantista, s-on Everardo Backheuser, prof. de la politekniko, f-inon Yrani Baggi de Araujo — sekretariinon, kiu vigle laboras jam kelkajn jarojn por la societo., s-on J. B. Mello Suza, ĉefdirektoron de la Oficejo de la Ministro de internaj aferoj kaj publika klerigado kaj multajn aliajn inter kiuj kelkajn kuracistojn. Menciinda estas la nomo de s-o Elba Dias, direktoro de la Antena, organo de Radio-Klubo, ĉe kiu mi faris per Radio franclingve paroladon pri esperanto.

Brazila Ligo Esperantista havas 11 grupojn en diversaj urboj kaj eldonas „Brazilan Esperantiston“.

La 13/XI en la Muzika Salono mi parolis franclingve pri pola historio antaŭ kaj postmilita, pri ekonomia situacio, pri Zamenhof kaj Esperanto. Ĉeestis 120 personoj el la brazila inteligentularo kaj franca gasto s-o Agache — eminenta arkitekturisto, kiu ellaboras planojn por la renovigo de Rio de Janeiro. Li estas ankaŭ eminenta samideano flue parolanta.

La 24/XI en la salonoj de Pola Legacio kunvenis la brazila esperantistaro kaj multaj eminentaj gastoj, invititaj de s-o Ministro D-ro T. Grabowski, kiu tralegis sian paroladon pri Polujo kaj Esperanto. Sekvis la dankparolado de s-o vicprezidanto Porto Carreiro Neto, post kiu estis tranŝonita al s-o Grabowski bela bronza medalo de D-ro Zamenhof, kiel memorarĝo de la pol-brazila amikeco.

Mi ankaŭ parolis pri la neceso de la lingvo internacia kaj pri la interna ideo, kiu celas kunlaboradon de tuta homaro, de ĉiuj popoloj de la mondo en konkordo kaj amema sento. Oni diris al mi poste, ke preskaŭ ĉiuj povis kompreni kaj estis tre kontentaj de mia elparolado konstatante, ke la poloj prononcas tre bone esperanton. La ĵurnaloj priskribis tre detale nian feston.

Dimanĉon la 25/XI mi faris kun kelkaj samideanoj promenon en ĉi tiea botanika ĝardeno. Kiel iometa botanikisto mi admiris la kreskaĵojn, kiujn mi konis nur el la botanikaj orangerioj — tie ĉi ili kreskas libere sub la tropika ĉielo. Grandegaj arboj, palmoj, orkideoj, antaŭ ĉio la mirinda grandega Victoria regia — floranta. Mirindajoj!

Ni povis eĉ gustumi bonegajn fruktojn de Artocarpus, kies delikata enhavo simila al la plej delikata krema kuko estis manĝita kun gajo kaj ĝojaj ridoj, ĉar

forestis tablo, la frukto kuŝis surtere, ni devis elpreni la pecetojn per jus el palma ligno tranĉitaj bastonetoj. La frukto estas granda — pezas 3—5 kilogramojn — do oni povis sufiĉe manĝi eĉ satiĝi, kaj poste trinki puregan akvon el naturaj ujoj en folioj de speco de banano, kiu konservas la akvon, kiel kamelo, en interfoliaj ujoj.

Odo Bujwid.

Rio de Janeiro, 27/XI 1928.

PAROLADO DE S-O MINISTRO DE POLLANDO, T. GRABOWSKI.

DUM LA AKCEPTO DE „BRAZILA LIGO ESPERANTISTA“

ĉe la Pola Legacio en Rio de Janeiro, la 24 de Novembro 1928.

Estimataj Gesinjoroj!

Mi profitas plezurano okazon de la alveno al Brazilo de D-ro Bujwid, estimata gasto de la Pola Legacio, profesoro de la Krakova Universitato kaj fervora propagandisto de Esperanto-lingvo internacia, por saluti vin ĉiujn tie, en la simbola angulo de Pola lando, patrujo de nia neforgesebla majstro, Ludoviko Lazaro Zamenhof, kaj lulilo de Esperanto.

Mi bonvenigas Vin, Estimataj Gesinjoroj, parolante Vian kaj samtempe nian internacian lingvon, mi salutas la grupon de brazilaj pioniroj, kiuj pravas neceson de la alproksimiĝo de nacioj kaj eblon de kunlaborado per la propagando de la komuna lingvo por la tuta homaro.

Vi penadas neniiĝi la grandan kaj gravan „obstinan baron“, diverslingvecon de la popoloj.

Mi estas fiera, kiel reprezentanto de Polujo ĉe Via bela, ĝoja, gastema lando Brazilo, — de Polujo, kiu havas la honoron bonvenigi Vin, Brazilaj Pioniroj de la Lingvo Esperanto.

Mi estas fiera, ke precipe el Polujo eliris la lingvo Esperanto; ke ĉie, kie ĝi estas parolata, ĉie, kien ĝi alvenas, oni devas komenci per la nomo de Pollando.

Ne estas ja hazardo, ke tiu lingvo eliris el Polujo, malliberigita kaj katenumita de la fremdaj potencoj. Saĝega logiko de la historio de popoloj igis la fakton, ke la nacio pola, perforte malhelpita, dank' al la genia eltrovo de ĝia filo, rompis barojn, konstruitajn de la fremdaj potencoj, kaj liberigita anime ekflugis en larĝajn vastojn de la internacia vivo.

Eĉ vivante en malliberejo — Polujo jam liberiĝadis!

Kiel Vi jam scias el la gazetaro, ni festis antaŭ nelonge la unuan datrevenon de la dekjara reekzisto de la Pola Ŝtato.

Estas samtempe la rememorigo de cent-kvindek-jara baraktado de kelkaj generacioj pro la sendependeco.

Bataladis, tion celante, militistoj kaj revoluciuloj, en multegaj batalkampoj; bataladis malliberuloj en malliberejoj kaj Siberiaj minejoj; bataladis predikistoj ĉe la predikejoj; instruistoj ĉe lernejoj, literaturistoj, ĵurnalistoj, teatraj aktoroj en scenejo; industriistoj, agrikulturistoj, bataladis laboristoj dum sia potaga laboro por sia ekzisto.

Ofte, tre ofte — pro siaj politikaj konvinkoj, kaj pro la amo de la patrolando ili gravege suferadis, malliberigataj, batitaj, eĉ pendigitaj.

Doktoro Zamenhof ankaŭ batalis! Laŭ sia metodo. Li eltrovis potencon armiton, ne kruelan, sed longe-penantan, flekseblan, flugeman, por ĉiuj utilan, sed antaŭ ĉio — noblan!

Dank' al ĝi, la maljusto, farita al Pola lando kaj nacio, iĝis pli kaj pli evidenta, — dank' al ĝi, la mensogo kaj malvero ne povis tiel triumfi en la mondo.

La graveco de la Zamenhofs ideo estas en ĝia kreema forto. Ne detruas ĝi, sed konstruas; — ne fermas, sed malfermas horizontojn; — ne malproksimigas, sed alproksimigas diverslingvanojn.

En nia modesta rondo ni festas hodiaŭ la altan ideon inter la civitanoj de la nobla, gastema Brazila Nacio.

Mi profitas la okazon por substreki mian admiron por la juna, jam propran tradicion posedanta nacio, kies kulturo kreskas kaj disvastiĝas inter tiom diversaj rasoj kaj popoloj.

Mi korege dankas al „Brazilo Esperanta Ligo“ por la afabla kaj gastema akcepto de Profesoro Bujwid, — por la bele aranĝita vespero en la „Musika Lernejo“, — por la afabla ekinteresiĝo je nia lando kaj nacio.

Mi dankas tutkore al la aro de la Estimataj Gastoj, apartenantaj al la Brazila Societo, al la ĵurnalistoj, — anoj de la brilege disvolviĝanta brazila gazetaro, — kaj al la amikoj de la Pola Legacio, kiuj bonvolis alveni kaj reprezentas la pola-brazilan alproksimiĝon. Mi certigas, ke ĉiu, kiu unufoje vizitis Vian landon, jam estas kunligita kun Via Nacio.

Mi levas la glason je la honoro de la „Brazila Esperanta Ligo“, je la Pola-Brazila Frateco, je la honoro de miaj karaj Gastoj, — en la manoj de Sinjoroj: honora Prezidanto, Profesoro Everardo Backhauser, kaj Prezidanto de la Brazila Esperantista Ligo, Sinjoro Alberto Coute Fernandes, ankaŭ je la honoro de nia gasto, prof. Odo Bujwid, kiu estas vivanta ligilo kaj reprezentanto de la solidareco interesantista. Vivu Esperanto!

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.

Pola Teritorio. Ĉefdelegito: J. Szapiro, Lipowa 33, Białystok.

OFICIALA BULTENO No 4.

PREMIOJ POR FRUPAGINTOJ — Ĝis 31. 1. 1929. La membrojn de nia Asocio, kiuj pro iaj ajn kaŭzoj ĝis nun ne sukcesis repagi sian kotizon, certe ĝojigos la sciigo, ke la Centra Oficejo pro malfrua dissendo de revarbiloj decidis plilongigi la tempolimon por ricevo de premio por frupagintoj ĝis la 31-a de Januaro 1929. Do, ĉiu membro (ĉu nova aŭ malnova), kiu pagos plene sian kotizon ĝis tiu dato rajtas ricevi senpage unu volumon laŭ sia elekto de la fama biblioteko „Internacia Mondliteraturo“. Pagante la kotizon al la loka Delegito aŭ la Ĉefdelegito la aliĝantoj bonvolu indiki, kiun volumon ili elektas, aŭ eventuale skribi sur la aliĝilo la vorton „Lauvola premio“. Se neniu indiko pri premio estos farita, la Ĉefdelegito estos devigata demandi speciale la aliĝinton kaj ne sendos premion ĝis ricevo de informo. Tial por rapide ricevi vian premion indiku tuj ĉe la aliĝo, kiun vi elektas.

ŜANGO DE KATEGORIO DE MEMBRECO. Ni informas, ke ŝanĝo de kategorio de membro estas ĉiam ebla. Ekz. M, paginta 6 zł., povas poste alpagante 9 zł. fariĝi MA. Tiukaze li ricevos ĉiujn aperintajn numerojn de „Esperanto“. Do, samideanoj, ne povantaj unufoje pagi 15 zł., povas aliĝi dume kiel M kaj poste alpagi ĝis plena kotizo de MA.

IMITINDA EKZEMPLO. Oficialaj kotizoj estas por M 5 sv. fr. jare kaj por MA 12,50 sv. fr. jare. Tamen por nia lando, kiel oni scias, la C. O. starigis favorajn kotizojn: 6 zł. por M kaj 15 zł. Nia membro s-o Br. Jablkowski en Varsovio, konsiderante la malfavoran financon situacion de UEA, ne deziris profiti tiun favoron kaj pagis sian kotizon de MA laŭ plena kurso de svisa franko. Publike dankante lin por tiu zorgo kaj fideleco al UEA, mi esperas, ke ankaŭ aliaj samideanoj, al kiuj ilia financa situacio tion permesas, sekvos tiun imitindan ekzemplon.

FAVORA ABONO DE „POLA ESPERANTISTO“. Responde je demandoj ni informas, ke la malkara abonprezo de „Pola Esperantisto“ (5 zł. anstataŭ 8 zł. jare) povas esti pagita de la MA ĉu samtempe kun la kotizo aŭ aparte poste ĝis fino de la asocia jaro. Indiko de membronumero en okazo de posta aparta alsendo de abonprezo estas necesa. Abonoj, rekte sendataj al la administracio, ne ĝuas la favoran prezon. La favora abonprezo estu do pagita al la loka Delegito aŭ al la Ĉefdelegito.

STATO DE UEA EN POLUJO. La 1-an de Januaro 1929 UEA havis en Polujo jam 126 membrojn (35 M, 86 MA, 2 MS, 3 DM). La membroj bonvolu helpi al la Delegitoj, varbante novajn kaj instigante al realiĝo la malnovajn membrojn. La nombro 1.000 membroj devas esti atingita en 1929 en Polujo por pruvi, ke Esperanto vivas kaj progresas en la lando, kiu estis ĝia lulilo.

NOVAJ DELEGITOJ. Nia Delegitaro en Polujo denove pligrandigis pro starigo de jenaj novaj Delegitoj kaj Vicdelegitoj:

NOWOGRODEK. D. Michał Chmieliński, inĝeniero-ŝtatifocisto, Dyrekcja Robot Publicznych.

STRYJ. VD. S-ino Erna Zimand, instruistino, ul. Batorego 11, ĉe Rachela Katz.

WOLBROM. D. Tolek Mitelman, bankgvidanto, Bank Kupiecki.

Informo pri novaj Delegitoj kaj Vicdelegito en Lwów pro formalaj kaŭzoj aperos en sekvonta bulteno.

Białystok, la 1. I. 1929.

J. Szapiro, Ĉefdelegito de UEA.

CITADELO DE ESPERANTO.

Antaŭ ĉio — malgranda necesa klarigo: tiu-ĉi artikolo ne estas destinita por polemiko. Mi ne intencas per ĝi ekdiskuti kun samideanoj, havantaj aliajn opiniojn, mi sole deziras konstati, kiom eraraj ofte estas la opinioj de tiuj esperantistoj, kies fideleco simple jam fariĝis fanatikeco. Tamen oni ne kredu, ke mi tiel-ajn deziras ĉi-tie defendi tiujn, kiuj tuŝas la aŭtoritaton de nia Fundamento. Neniam! Mi mem estas fidela al nia Zamenhofa lingvo kaj mi kontraŭbatalas ĉiun lingvan ideon, kiu malkonsentas kun tiu pura Zamenhofa lingvo. Tamen inter la „fideluloj“ mem, interne de tiu nia „citadelo“, troviĝas individuoj, kies opinio pri nia Fundamento estas esence tiel falsa, tiel erara, ke mi ne povas ne tuŝi tiun-ĉi aferon en speciala artikolo.

Ĉiu el ni scias, ke en nia movado ekzistas du „malamikaj“ tendaroj: unu, kiu opinias, ke esence la strukturon de Esperanto minacas jam neniu danĝero, sekve oni povas, se utile, enkonduki novaĵojn, la dua, kiu konsistas el severaj gardantoj de niaj lingvaj leĝoj, formas la veran citadelon de Esperanto. Principe ambaŭ „partioj“ batalas en nomo de „libereco de lingva evoluo“, rilatigante sin al la samaj leĝoj de nia lingvo, al la samaj asertoj de Dro Zamenhof k. t. p. tiel, ke fakte oni povas havi la impreson, ke inter tiuj ambaŭ partioj, kies „batalo“ kostis jam kaj ankoraŭ kostas sufiĉe da inko, tempo kaj foŝado en la Fundamento, ekzistas nur — miskompreno aŭ senbaza obstinigo. Multaj sinceraj kaj konsciaj esperantistoj, kiel s-o Jung (red. de Heroldo) komprenis la malutilecon de tiu „uragano en glaso da akvo“ kaj submetiĝis al la decidoj de la Lingva Komitato. Ni esperu, ke la aliaj sekvos s-on Jung, kaj baldaŭ modela unueco ekregos en nia movado. Ĝuste tiam do fariĝas aktuala la demando pri „libera evoluo“, ĉar ĝuste inter la plej fervoraj oficiroj de nia citadelo ne regas unueco pri tiu demando.

Ke nia lingvo rajtas kaj povas evoluadi, tion neniu povas ja malkonsenti, ĉar tiun-ĉi liberecon garantias al ni la Fundamento. Temas do pri tio, kiaj estas la limoj de nia „libereco“ kaj kion signifas „evoluo“ laŭ kompreno de niaj „citadelanoj“? Tiuj lastaj riproĉas al siaj „kontraŭuloj“, ke ili trouzas tiun liberecon. Bone, sed la esperantistaro devas ja scii, el kio konsistas nia lingva libereco, kaj tion niaj „oficiroj“ ne diras.

Antaŭ kelka tempo mi eksciis de esperantisto, kies nomo estas sufiĉe konata, ano de la Lingva Komitato, ke la vorteton „ĉi“ oni ne povas en Esperanto uzi senpere kun iu substantivo (ekz. ĉi-tablo anstataŭ ĉi-tiu tablo k. t. p.). Ĉar tiu sinjoro opinias sin kompetentulo pri Esperanto, mi speciale komencis esplori tiun aferon, kaj jen mi nenie trovis iun-ajn mencion pri la neuzoteco de la vorteto „ĉi“ en supre montrita maniero. Esence la vorteto „ĉi“ — laŭ Zamenhof — pli-proksimiĝas la esprimotan ideon. En siaj Lingvaj Respondoj Dro Zamenhof klarigas, ke tiun-ĉi vorteton oni povas meti ĉu antaŭ, ĉu post la pronomo „tiu“, sekve tio signifas, ke la vorteto „ĉi“ estas memstara VORTO, do oni povas uzi ĝin laŭvole ne nur kun iu pronomo, sed ankaŭ kun aliaj formoj. La vorteto „ĉi“ ja ne estas afikso, kiu nepre devas stari antaŭ resp. post iu radikilo. Cetere tia formo, kiel „ĉi-tablo, ĉi-parolo“ k. t. p. jam bone akceptiĝis en nia lingvo, kaj estas senrespondeco aserti, ke la uzado de tiu formo estas kontraŭfundamenta!

Mi nur citis tiun-ĉi ekzemplon por montri, kiom necesa estas la reguligo de la limoj de nia „libereco“ (aŭ — se vi volas — „mallibereco“). Se tio ne okazos, minacas nian movadon la danĝero de senĉesaj disputoj. Mi komprenas, ke nia Citadelo volas kontraŭbatali diversajn eksperimentojn pri novaj formoj, sufiksoj aŭ radikiloj, sed kiu rajtas kondamni la plene fundamentan uzadon de fundamenta vorto en maniero iom pli libera ol ĝis nun?!

Tiuj oficiroj de la Esperanto-citadelo en sia senmezura fanatikeco forgalopis jam tiel malproksimen, ke ili simple jam ridindigas sin pro la sin-ligo per fina muro, kiun ili penas fari el nia Fundamento. Mi konsentas pri nepra fideleco al nia Fundamento, sen ĝi mi tute ne imagas la estontecon de Esperanto, sed tiu-specca fideleco, kiel tiu de la supre menciita sinjoro, kaŭzos rekte kontraŭan efikon. Tio memorigas al mi la fablon pri urso, kiu mortigiĝis sian amikon-homon, jektante sur lian frunton pezan ŝtonon, dezirante tiamaniere forpeli muŝon, kiu sidigiĝis sur la frunton de l' homo kaj turmentis lin. Tia fideleco estas blinda, ne vidanta la sekvojn, kaj ĝin ni devas kontraŭbatali ne malpli ol la „malfidelecon“ de la unua tendaro...

La ĝendarmoj de la citadelo de Esperanto pli bone prenu denove en siaj manojn la Fundamenton kaj lernu el ĝi la saĝajn instruojn de Zamenhof, kiu plej bone formulis la lingvan liberecon, kaj kiun certe tiuj ĝendarmoj anatemus, se li mirakle estus eltombiĝinta...

I. Lejzerowicz (Łódź).

TRADUKA KONKURSO.

Traduku kaj sendu ĝis la 28, II, tj. al Dro Dreher, Kraków, Starowiślna 37. La premiito rajtos elekti el la librejo de „P. E.” librojn en valoro de 4 zł.

— Nie, to skandal, jakich mało!

— Cóż się stało, mój kochany?

— Zmarzłem jak pies, to się stało. A to dopiero balwany! Wystaw sobie, jestem w mieście; mróz, na niebie ani chmury, aż tu narodu ze dwieście stoi i patrzy do góry. Patrzą i ja; na komuny, na dachy, precz dokola; patrzę z jakie pół godziny, no i nic nie widzę zgoła. Więc pytam się najbliższego tu obok sąsiada, co to się stało takiego? „Nie wiem” — sucho odpowiada. Pytam baby i ta nie wie. Mysłę sobie, pal ich licha! Pójdę już; bo byłem w gniewie. Albo nie; ludzie się roją, poczekam chwileczkę małą; przecież jak głupcy nie stoją. Oto co się pokazało: jacyś dwaj się założyli, że gdy kto stanie przed bramą i spojrzy w górę — po chwili sto osób zrobi to samo. I proszę cię, trzy godziny tłum stał tak na środku drogi, z łbem do góry, bez przyczyny. Najbardziej mi zmarzły nogi; choć tłułkiem jedną o drugą. Bodaj ich djabli porwali!

— Dlaczego-żeś stał tak długo?

— A dlaczego inni stali?”

[M. Rodoć (Biernacki) 1836—1901].

Konsilo. Traduku tre simple (verse, se vi scipovas), ne tro elektante la vortojn. Ĉifoje la konkurso estas ja ne tre malfacila!

POLLANDA KRONIKO

Dąbrowa Górnicza. La Esperantista Sekcio ĉe la T. U. R. (Societo de la Laborista Universitato) aranĝis la 16/ XII pj. gajan gastvesperon kun riĉa programo E. kursojn gvidas vicdel. de UEA Czesław Rabenda.

Katowice. La Societo de Esperanto Amikoj aranĝis la 16/ XII pj. solenan festvesperon. Prelegis s-oj Faruga kaj Tichawski. Oni organizis belan ekspozicion de libroj kaj esperantajoj.

Kraków. Gravan sukceson akiris nia movado en la Universitato. Lektoro de la lingvoj internaciaj ĉe U. J. s-o W. Jezierski komencis prelegi pri esperanto (ĉiumerkrede kaj sabate de 18 ĝis 19 horo en la salono 32 je unua etaĝo). Antaŭ nelonge s-o Jezierski estis „interlingvano”, sed nune, kiel li mem diris „la vivo pruvigis lin”, ke nur unu lingvo internacia estas taŭga — tio estas esperanto. Li do iĝis fervora nia batalanto. La 5/1 nj. prelegis s-o A. Smit pri Holandujo. Lerte tradukis s-o J. Toczyski, sekr. de S. E. R. Studenta Esperantista Rondo denova kunvenas ĉiumerkrede je la 19 h. en la salono 4a Coll. Nov. de U. J. La 9/1 nj. parolis vicprez. de S. E. R. s-o T. Hodakowski pri „Lingvoj kaj rasoj”.

Plej multe legata ĵurnalo „I. C. Kurjer” aperigis la 17/1 nj. grandan favoregan artikolon de s-o T. Hodakowski pri esperanto en uzo de pola eksterlanda propagando.

Królewska Huta. Ligo Esperant. de Pola Silezio solenis la 15/ XII pj. la Zamenhofan feston ligitan kun ekspozicio de libroj kaj familia kristnaska vespero. Ĉeestis 60 personoj. Parolis s-oj Kołodziej, Schmidt, D-o Broder, Rozen k. Weihs.

Lublin. Krom multaj klopodoj kaj elspezoj de ĉi-tiea esperantistaro prelego de s-o Smit el Holandujo ne okazis.

Warszawa. Esperantista Rondo „Konkordo” vikle laboranta aranĝis dum decembro rican ekspozicion kaj belegan festvesperon. Oni disaŭdigis ankaŭ la esp. prelegon el la varsovia radjostacio. La 7/1 Akademia Esp. Rondo organizis prelegon de s-o Smith (bedaŭrinde kun duhora malfruigo, kio malpacienigis alvenintojn) pri Holandujo, tradukitan de s-o Rytenberg.

La organo de ĝis nun sufiĉe malfavora por nia lingvo „Polskie Radio”, la se-majna gazeto „Ra” publikigas depost 1. I. 1929 radjajn esperanto-programojn, redaktatajn de s-o E. Wiesenfeld.

Kompilis Tejot (Przemysł).

KRONIKA ZAGRANICZNA.

Brazylja. Rio de Janeiro. Inż. A. Conto Fernandes, prezes Brazylijskiej Ligi Esperanckiej, rozpoczął pierwszy kurs Esperanta dla harcerzy. Uczestniczy 30 drużynowych harcerskich, którzy później będą prowadzić kursa w swoich drużynach. Otwarciu kursu przewodniczył p. G. Azambuja Noves, prezes Federacji harcerzy brazylijskich. Honorowymi prezesami obrano prof. Dra Odo Bujwida z Krakowa i prof. A. Agache z Paryża, którzy w języku esperanckim powitali młodych uczestników kursu. — Federacja Harcerzy Brazylijskich, która liczy około 50.000 członków, rozwija silną propagandę za wprowadzeniem Esperanta do Związków harcerskich innych narodowości.

Węgry. Budapeszt. Największe węgierskie „Stronictwo Narodowe” wydało w języku esperanckim historję Węgier w formie niedużej broszurki. Każdy Esperantysta może ją otrzymać bezpłatnie po zwróceniu się pod adresem: Dro Julio Lukács, Pillängo utca 13. Budapeszt VII.

Austrja. Wiedeń. Gmina miasta Wiednia postanowiła na skutek starań „Oesterreichisches Arbeiter-Esperanto Bund” nazwać nową ulicę w XII. dzielnicy ulicą Zamenhofs.

Z okazji międzynarodowej robotniczej Olimpiady w Wiedniu w r. 1931 przedsięwzięło „Askö” na wielką skalę akcję kursów Esperanta.

Szwecja. Stokholm. Nauka esperanta rozwija się w obecnym roku w stolicy ogromnie szybko. Dotychczas rozpoczęto 25 kursów w różnych częściach miasta.

Ludwika. P. Tiberio Morarin rozpoczął bardzo szczęśliwie pracę esperancką na terenie tego miasta. W dniu 30. X. z. r. przemawiał o esperancie do przeszło 500 osób, poczem rozpoczął w tem mieście kursa. Na pierwszej lekcji było obecnych 54 słuchaczy, na następnych liczba słuchaczy wzrosła do 67. Dalsze kursa wykazały również stały wzrost liczby frekwentantów.

Niemcy. Döbeln. W dniu 20. I. br. odbędzie się zjazd Esperantystów Środkowej Saksonji. Otwarcie zjazdu odbędzie się o godz. 10-tej w hotelu „Bawarja”. Według dotychczasowych zgłoszeń zjazd zapowiada się imponująco.

Naumburg. Miejscowa grupa G. E. A. urządziła w dniu 29. XII. z. r. uroczysty oplatek. Po odśpiewaniu hymnu esperanckiego przemówił prezes, Dr Holländer. Dalszą część oplatki wypełniło przedstawienie i część muzyczno-wokalna.

Japonja. Tokio. „Eskulapida Grupo”, federacja słuchaczy medycyny, odbyła szereg konferencyj, jak np. u Dra prof. Kauakami, u prof. Dra Niši, oraz wycieczkę do Koonodaj.

Verda-Stelo-Grupo urządziła w Pierwszym Narodowym Uniwersytecie szereg propagandowych odczytów na temat esperanta.

Esperantysty wyższych uczelni urządzili w czasie uroczystości wystawę esperancką i sprzedaż księzek esperanckich.

Na Uniwersytecie Nihon słuchacze medycyny urządzili kurs esperanta, prowadzony przez prof. Dra Niši i p. Ura, przez co zyskali 100 nowych członków.


Osaka. W uniwersytecie żeńskim p. Asai prowadzi kursa esp. dla 70 słuchaczy.

Radjo.

Nowym sekretarzem I. R. A. (Internacia Radio Asocio) został p. Poul Lendorff. Overbyes Allé 38 Kopenhaga. Pan Lendorff zwraca się w odezwie do wszystkich esperantystów-radioamatorów, aby zapisywali się na członków I. R. A. i dopomogli swą współpracą do rozwoju esperanta przez radjo.

Z najnowszej statystyki dowiadujemy się, że 66 pism fachowych radjowych w 24 państwach ma kącik esperancki lub też umieszcza artykuły o esperancie. Ostatnio poważna gazeta radjowa w Anglii „World-Radjo” wprowadziła od stycznia 1929 kącik esperancki.

Tuszkiewicz Br.



UZUPEŁNIENIE SŁOWNIKA POLSKO-ESPERLNCKIEGO

Antonieo Grabowskiego.

P. dyr. Józef Orzech umieścił w jednym z poprzednich numerów „P. E.” odezwę w sprawie uzupełnienia „Słownika polsko-esperanckiego” A. Grabowskiego. Pragnąc ruszyć sprawę z miejsca nie teoretyczną dyskusją nad sposobem przeprowadzenia tej myśli, lecz przez praktyczne, choćby częściowe jej urzeczywistnienie, zaczynamy druk uzupełnień. Oto kilka uprzejmie nam nadesłanych przez p. Dr. Leopolda Drehera, notowanych przez niego na marginesie słownika Grabowskiego. Prosimy wszystkich czytelników, którzy podobne notatki zbierali, o nadsyłanie materiałów celem dalszego ich kontynuowania.

(Red.).

abecadło	aboco
audytorjum	aŭskultantaro
bąblasty	vezikplena
babsko	virinaĉo
bachor	infanaĉo
baryła (brzuchacz)	ventregulo
bas	basvoĉo
beczeć	ploraĉi
bezcen, za-	malkarege, malkostege
bezczenny	karega, kostega
bezradny	senhelpa
bezpodstawny	senbaza, senkatŭza
bezwzględny	severeĝa
bęben p. bachor	
biadać	vei
biuletyn	bulteno
biuro	oficejo (kancelario, nie używane)
	saltpreni (po 8 ŝtupoj)
brać (po 8 schodów)	ŝvebi
bujac	viandaĉo
chabanina	vertraĝo
chart	ĥirurgo
chirurg	kamparano
chłop	malsentemo, senti pri
chłód (obojętność)	nazospiregi
chodźć o co	ŝultrotuko
chrapać	senbrue
chustka	senbrua, mal-
cichaczem	retiriĝi, retiri sin
cichy	mireĝinda, ĉarmega, ĉarmplena
cofać się	kelktempe, -foje
cudny	iomtempa, dum-
czasami, czasem	dumtempe
czasowy	oft(a)foje
czasowo	
częstokroć	

doba
 dobiéc
 doczekać się
 doczytać
 dodatni
 dopalić
 dopędzać
 dopierać się
 dostateczny
 doświadczać

diurno
 ĝiskuri, kuratingi
 ĝisatendi
 finlegi
 plusa
 finbruligi, -fumi
 kuratingi
 insisti
 kontentiga
 vivsperti

C. d. n.

KOMUNIKOJ DE P. E. D.

Ni konstatas kun bedaŭro, ke multaj grupoj ĝis nun ne respondis nian cirkuleron, aperintan en oktobra numero de „P. E.” pri statistiko de la grupoj kaj pri komuniko de l' nomoj por la listo de oficialaj instruistoj de Esperanto. Ni refoje petas la grupoj respondi nian cirkuleron.

La E. K. starigis konstantan ekzamenan komisionon konsistantan el S-oj dir. Tor, dr. Rosenstock, Kuhl kaj dr. Dreher. Personoj, kiuj intencas akiri atestejn necesajn por la listo de instruistoj aŭ fari ekzamenon pri kapableco bonvolu skribi al dr. L. Dreher, Kraków, Starowiślna 37.

Kurso per radjo estas tre necesa. Tial la E. K. instigis la Internacian Centran Komitaton, Genève, turni sin al la radjo-stacio en Katowice, ke ĝi enkonduku Esperanton en sian programon. Por ke nia akcio sukcesu estas necese, ke la grupoj instigu siajn mombrojn al multnombra postulo ĉe la nomita radjo-stacio de starigo de Esperanta kurso.

Ekzekutiva Komitato de P. E. D.

AL LA TEKA-ANOJ!

Kaŭze de tute private-personaj kialoj mi devas rezigni el la ofico de la TEKA-prezidanto. La decido estas absolute neŝanĝebla kaj mi ne povus eventualan reelekton akcepti. Ĉe tiu okazo mi plej kore dankas al ĉiuj gekunfratoj, kiuj bonvolis amikece helpadi min en mia laboro por la TEKA.

Mi transdonas nun la oficon en la spertajn manojn de nia ŝatata vicprezidanto Dro Róbin kaj petas turnadi sin en ĉiuj TEKA-aferoj al: Dro W. Róbin—Varsovio—Pollando—113. Marszałkowska.

Dro M. Blassberg (Kraków).

„LETERKESTO“

Al kelkaj legantoj. Kiel ni konstatas, kelkaj niaj amikoj komprenis nek la formon, nek la intencon de l' aperinta en la novembro N-o de nia gazeto „Letero al ĉiuj redaktoroj“ de nia poeto Eska. Tial ni opinias necesa klarigi por la nesufiĉe atentaj legantoj, ke la „Letero“ estas verkita en modela formo de klasika soneto; oni nur provu transskribi ĝin en versoj! Koncerne la sprite, kvankam iom malice esprimitan intencon de l' poeto, ĝi estas bedaŭrinde plenplene prava: tion da versajoj verkitaj de komencantoj kaj... komercaj helpantoj aperis en nia lingvo, ke tio vere „kaŭzas dolorĝemojn“. Ni supozas, ke post tiu ĉi klarigo eble oni komprenos iometan diferencon inter la stilo de poeto kaj komerca helpanto.

Al S-o Cz. Pr., Lublin. Kun la postulo pri la atesto de tiel brile farita ekzameno bonvolu vin turni al S-o E. Wiesenfeld, direktanto de t. n. „Pola Esperanto Instituto“, kiu tiun ekzamenon tiam aranĝis kaj kiu do devus la ateston al vi liveri. Oni devas tamen rimarki, ke tia atesto estus tute privata, ĉar laŭ nia scio la „Instituto“ ne estas aprobita de la ŝtataj aŭtoritatoj. Tiun aprobon bedaŭrinde posedas ankoraŭ neniuj organizaĵoj esperantista en Polujo.

ADMINISTRACIAJ SCIIGOJ.

ANIAJ REPREZENTANTOJ EN BIALYSTOK, KATOWICE, PARIS KAJ WARSZAWA.

Ni atentigas niajn ĉ. gelegantojn, ke ni donis reprezentadon de nia revuo en Bialystok al „Esperanta Societo Zamenhofa“. Kupiecka 49, en Katowice al „Societo de Esperanto Amikoj“ Wawelska 3, en Paris al s-o Salo Grenkamp, rue de Vaugirard 4 en Warszawa al „Pola Studenta Esperantista Societo“ Leszno 99 m. 5. Bonvolu do aboni, pagi anoncojn, mendi librojn kaj gazetoin ktp. pere de niaj reprezentantoj.

ĈEFDELEGITO DE UEA POR POLUJO J. ŜAPIRO,
BIALYSTOK, LIPOWA 33.

NE FORGESU RENOVIGI LA ABONON.

ABONU MEM KAJ VARBU ANKAŬ ABONANTOJN POR
LA SOLA ESPERANTA GAZETO EN POLLANDO!

UWAGA! WAŻNE DLA KORESPONDUJĄCYCH Z ZAGRANICĄ!

A T E N T O !

Apartaj represoj de aperinta artikolo en decembra n-o de P. E. pri

„POLAJ KRISTNASKAJ KANTOJ“

kun esperanta traduko de du kantoj kun muziknotoj
estas aĉeteblaj ĉe:

Admin. de Pola Esperantisto po 0.35 gr. aŭ 0.20 sv. fr.

Por grupoj rabatita prezo minimume 10 ekz. 2.70 zł. aŭ 1.80 sv. fr.

MUZIKNOTOJ de Foxtrott -- Black-Bottom

„K — O — R — O“

Frapanta kaj bela melodio kun humorplenaj vortoj
de Raymond Schwartz kaj pola traduko.

Prezo: 3 zł. kun afranko.

Mendu ĉe Pola Esp. Asocio, Lublin poŝtkesto 74.

LIBREJA FAKO

DE

POLA ESPERANTISTO.

REKOMENDAS:

	Zl.
Albumo de l' VIII en Kraków. Luksege eldonita kun 600 fot.	15 00
<i>Batucki</i> — Kuzeto. Komedio en traduko de S. Grenkamp	0 60
<i>Conpet</i> — Frazazo	2 50
<i>Czubryński</i> — Esperanto i Esperantyzm	1 20
— Esperantyzm. Wyd. II.	3 00
Diversaĵoj, rakont. el Lemaitre, Rosny, Auriol	2 00
<i>Dumas</i> — La Kolomba premio	1 00
Ilustrita Gvidlibro tra Pollando kaj Danzig — Gdańsk eldon. de la P. E. D. Kraków 1927	1 50
Kongreslibro de l' VIII. en Kraków. Riĉe ilustrita	1 00
Kvar noveloj el la hungara lingvo	1 50
<i>Mickiewicz</i> — Improvizacio de Konrad	0 50
<i>Mollère</i> — L'avarulo	1 80
Prozo el danaj — norvegaj aŭtoroj	1 50
La verkoj de Zamenhof.	
Ekzercaro	0 55
Fundamento de Esp. (5-lingva)	2 30
Fundamenta Krestomatio	5 60
La predikanto	1 00
Lingvaj Respondoj	2 80
Proverbaro Esperanta	2 70
<i>Andersen</i> — Fabeloj I kaj II parto po	3 30
<i>Goethe</i> — Ifigenio en Taŭrido	3 30
<i>Gogol</i> — La Revizoro	3 30
<i>Heine</i> — La Rabeno de Baharah. La Gimnazio	2 30
<i>Mollère</i> — Georgo Daudin	1 75
<i>Orzeszko</i> — Marta	5 50
<i>Schiller</i> — La Rabistoj	3 30
<i>Shakespeare</i> — Hamleto	2 75

POR SENDKOSTOJ ALDONU 10% — NUR ANTAŬPAGO.

KRAKÓW, UL. SMOLEŃSKA 9.
KONTO P. K. O. 406.660.